

Vinko Ošlak

## El mia taglibro, junio 2009

### Ĵaŭdo, 4-an de junio

Hodiaŭ je 12-a horo la prezidento de Usono Barak Husein Obama parolis en la granda aŭlo de la universitato de Kairo. Per tiu ĉi parolado li volis marki kaj starti sian komplete novan politikon rilate al islamaj ŝtatoj. Liaj kunlaborantoj tre bone traserĉis historion de islamo koncerne Usonon kaj ĝian historion. Tiel li komencis per mencio, ke Maroko kiel la unua ŝtato en la 18-a jarcento agnoskis suverenecon de Usono.

Dum sia tuta parolado li uzis sintagmon „Holly Koran” (la sankta Korano); li eĉ citis Jefferson, ke li prenis Koranon por same sankta libro kiel la Biblio. Li eldiris formulon, kiu klare montras lian veran religian statuson: Moseo, Jesuo kaj Mohamedo preĝis kune...

Lia parolado enhavis tri bazajn tezojn: 1. Islamo ne estas parto de problemo, nur unuopaj minoritataj teroristaj grupoj enkadre de ĝi. 2. Islamo estas samsolida kaj samvalora religio kiel la instruo de la kristana evangelio. 3. Usono revizias sian ĝisnunan sintenon al islamo kaj volas kunlabori kun ĝi.

En politika senco Obama apologias postulon de propra palestina ŝtato apud la israela. Li prisilentis la nepran konsekvencon: novan dividon de la urbo Jerusalemo. Tio estas kontraŭ la plano, kian Dio havas pri la estonto de Israelo kaj la mondo.

Sub la stranga impreso post tiu ĉi parolado mi ne povas plu anticipi ekskludi eblecon, ke ĝuste la nuna kaj eble la lasta usona prezidento estas tiu Antikristo, kiu kun Israelo unue subskribos packontrakton – kaj poste venos la tempo de grandaj plagoj, kiel oni povas legi en Apokalipso 6, 8, 9, 10...

### Vendredo, 5-an de junio

Timoteo rakontis al mi pri siaj plagoj. Evidente la kontraŭevangelia spirita potenco volas lin elkomuti el lia evangelia laboro kaj kristana vivo. La plej tradicia metodo, tiel dramece atestita jam ĉe Hiobo, estas malsano. La dua tradicia metodo estas premo de superuloj en profesio, kiun oni niatempe difinas per la angla vorto *mobbing* – tute senbezone, kompreneble. Mi estas ĝoja, ke Timoteo insistas en Kristo kaj ties spirito.

Baldaŭ asociiĝis Floriano. Ni parolis pri la fenomeno „Obama” sub la biblia vidpunkto. Multaj eventoj kaj spiritaĵoj diras, ke Antikristo jam vivas sur nia planedo. Kaj almenaŭ kelkaj detaloj permesas supozi, eventuale spekulacii, ke tio povus esti Barako Huseino Obama. Nia konkludo: „Kio troviĝas en Dia plano, tio okazu laŭeble frue! Ni ne priploros la teron kaj la homaron, kiaj ili estas.”

La hodiaŭan biblian vesperon gvidis nia frato el Vydibil en Svislando. La temo estis la komenco de la 8-a ĉapitro el la epistolo al Romanoj, versikloj 1-2: „*Ekzistas do jam nenia kondamno kontraŭ tiuj, kiuj estas en Kristo Jesuo. Ĉar la leĝo de la Spirito de vivo en Kristo Jesuo liberigis min de la leĝo de peko kaj morto.*” Lia eksegezo estis, ke ni ne falu denove en panikajn zorgojn, ĉu ni vere faris ĉion el nia devo, ĉu ni vivas sufiĉe modelan kristanan vivon. Ĉio-ĉi ne estas relevanta. Ni havas unu nuran devon: fidi al nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke jam li faris ĉion kaj ni havas parton en tio, se ni lin plene fidas. Se ĉeestus katolika aŭskultanto, li certe skandaligus, aŭdante, ke li ne havas plu devojn ion fari kaj ke Kristo faris ĉion.

Kompreneble Kristo ne laboras anstataŭ kristanoj en ĉiutagaj devoj por sia pano kaj vino, por siaj vestaĵoj kaj tegmento kaj similaj aferoj. Temas pri tio, ke li faris ĉion por nin deaĉeti de la peko kaj ĝia iniciatinto Satano kaj de la morto kiel konsekvenco de la peko. Kaj tiu, kiu tion ĉi kredas, kiel frukto de sia kredo, tre volonte kaj entrepreneme laboras por la bono de siaj proksimuloj kaj tiel ankaŭ por la bono de la tuta mondo, sed ne kvazaŭ plenumante devon, sed simple, ĉar li ricevis novan naturon, tiun de Kristo!

Sidante ĉe mia kutima tablo en la ĝardenkafejo de KIKA mi, okupiĝinte pri miaj paperoj, ne povis ne aŭdi strange kondutantan viron, sidantan kun sia edzino ĉe tablo relative malproksime de la mia. Li insultis aŭstriaajn politikistojn per ekstreme malgalantaj vortoj, uzante por tio ankaŭ fakterminaron pri zoologio, vere kriante, kvazaŭ li volus, ke oni lin aŭdu ĝis Vieno, sen ke li uzu telefonon. Liaj akuzoj kaj riproĉoj, ke ili eĉ malbonpreze vendis Aŭstrion al EU kaj tiel kunkaŭzis la financon kaj tutekonomian fiaskon ĉijare, estas ĝis certa grado trafaj. Sed kial mi, vidante la saman koruptecon, ne havas bezonon ilin tiel akre akuzi kaj subzone insulti? La diferenco estas, ke mi ne vidas koruptaj nur politikistojn, bankistojn, akciistojn, sindikatistojn kaj ĵurnalistojn, sed ĉiujn, kiuj ne vivas kun Kristo kaj en Kristo. Tio signifas, ke mi mem antaŭ mia konvertiĝo kaj novnaskiĝo estis precize la sama. Estas vere, ke ne ĉiu homo, eĉ se ne novnaskita kristano, proklamas militojn, organizas teroron, detruas ekonomian kaj materian vivobazon por milionoj da homoj – ĉar ne ĉiu posedas por tio nepran pozicion, povon, rimedojn kaj, tre grave, monon kaj oportunan ŝancon, okazon. Tial la kristano povas ĉion saman registri, aŭ eĉ pli ol tion faras la laŭtegaj protestuloj, kaj tamen resti en trankvila, baze ĝoja etoso sen kondamni tiujn, pri kiuj ŝajnas, ke la respondeco kaj kulpo troviĝas tute ĉe ili.

Alparolis min fraŭlino en helverda T-ĉemizo kaj kun surskribo „*Green Peace*”. Ŝi demandis min, ĉu mi, ĉu mi esus preta dum kelkaj minutoj paroli kun ŝi pri la aferoj de ŝia organizaĵo. Mi ŝatas homojn, se ili brulas pri io, kion ili prenas por pli grava ol propra komforto, eĉ se objektive la afero ne estas jam en akordo kun la instruo de Dio. Do, mi ŝercmaniere diris, ke mi havas tempon ĝis mia morto. Ŝi ridis kaj demandis, ĉu mi konas „*Green Peace*”. Mi respondis, ke jes kaj ke mi antaŭ jaroj ĝin eĉ subtenis. Logike ŝi emandis, kial mi tion ne faras plu, kaj tion mi fakte volis aŭdi. Mi diris, ke pro pluraj kialoj. Tiel pro iliaj metodoj, per kiuj ili foje eĉ ne hezitas uzi perforton kaj rompi leĝojn. Ŝi respondis, ke situacio tiusence en lastaj jaroj tre pliboniĝis. Tiam mi diris mian esencan kontraŭargumenton: ili doktrinas kaj agas, kvazaŭ la destino de la planedo troviĝus en la manoj de la homo. Sed fakte ĝi troviĝas en suverena plano de Dio, ĝia Kreinto kaj Konservanto. Ŝi respondis: „*Parte-parte...*” Mi objetis, supozante, ke temas pri katoliko: „*Absolute kaj ekskluzive en Diaj manoj!*” Ŝi vidis, ke ni ne havas komunan bazon kaj ĝentile adiaŭis.

Post iom da tempo mi vokis kelnerinon por pagi. Mi ŝerce diris: „*Estas bone, ke mi pagu, antaŭ ol mi mortos...*” Ŝi laŭte protestis: „*Ho ne, vi tiel ne devas paroli, vi estas ankoraŭ en plena kondicio...*” Aludante al Fil 1,23-25 mi diris, ke estas pli bone, esti supre kun Kristo ol daŭre duonvivaĉi ĉi tie sur la tero. La kelnerino ridante foriris, sed ŝian diskutrolon tuj transprenis sinjoro, sidanta en societo de virino: „*Vi tiel vere ne devas pensi...*” – li eventuale supozis, ke mi parolas el frustrado kaj eble eĉ troviĝas danĝero de suicido.

Mi uzis la okazon kaj al la najbara gasto diris, ke ne temas pri mia penso, sed estas tiel asertite en la Biblio, nome, ke estas pli bone troviĝi ĉe Kristo en la ĉielo ol ĉi-sube en la mondo de korupteco. Li respondis katolike: „*Sed la Biblio estas komponaĵo el veraj kaj malveraj versikloj, de aŭtentaj raportoj kaj legendoj. Konsideru ankaŭ enŝovojn kaj tradukerarojn.*” Ho, mi tre ĝojis pro liaj ŝajnargumentoj.

Mi do respondis al li, ke la Biblio ne estis ŝanĝita de homaj intervenoj, krom kelkaj ekstremaj okazoj kiel la nova falsifita traduko fare de atestantoj de Jehovo; ke plenumiĝo de pli ol mil profetaĵoj ĝin metas sur la pozicion, kian neniu alia libro havas, same ne la Korano aŭ Darmapado kaj aliaj „*sanktaj*” libroj.

Ĉar li daŭre insistis, ke certe okazis fuŝoj dum kopiado kaj tradukado, do mi devis starigi al li la saman demandon, kian mi starigas al islamano, kiu laŭ la instruo de Korano kredas, ke judoj kaj kristanoj la Biblion falsifis: Ĉu vi posedas la nefalsifitan originalon, laŭ kiu vi povus konstati kaj aserti, ke la publikigita Biblio estas falsifita?

Tiam mi rememoris, ke en mia aktaĵo troviĝas tre konvena evangeliza libro de Vilhemo Busch „*Jesus ist unser Schicksal*” (Jesuo estas nia destino). Li surprize dankeme akceptis mian donacon, eĉ kun peto, ke mi enskribu dediĉon.

Li komencis rakonti, ke lia filo studis filozofion kaj instruas en la teologia fakultato en Innsbruck. Konfirmiĝis mia supozo, ke temas pri katoliko. Nur la katikoj havas averaĝe tiel neseriozan rilaton al la Biblio. Li diris, ke li estas serĉanta homo kaj ke li multon ne povas kompreni aŭ akcepti. Mi respondis, ke Dio preferas homon, kiu disputas kun Dio ol tiun, kiu ĝentile ignoras. Mi adiaŭis de li en deziro kaj espero, ke Jesuo kontinuos la laboron. Nur li povas ŝanĝi ies koron ĝis konvertiĝa momento.

### **Dimanĉo, 7-an de junio**

Hodiaŭ en 16 eŭropuniaj ŝtatoj okazis balotoj por la parlamento en Strasburgo resp. Bruselo, tiel ankaŭ en Aŭstrio. La partopreno atingis iom pli ol 40 %; evidente homoj iom post iom lernas, ke EU ne estis fondita por ili. Socialdemokratoj plej multe perdis. Ili ne komprenas, pro kio kaj opinias „ne sukcesi sufiĉe bone informi la popolon pri siaj temoj”. Nu, mi opinias, ke siajn verajn „temojn” la fuŝsocialistoj tre bone montris per sia ĉefrola partopreno en ekonomiaj krimagoj kiel BAWAG k.s.; per komplete malkapabla kaj desto pli aroga intertempa kavaliro de blufado d-ro Gusenbauer; kaj per sia impotento okaze de la publika leĝrompado fare de la formortinta karintia provincestro d-ro Haider kaj liaj adlaturoj, kiuj sian sisteman primokadon de aŭstria konstitucio senĝene kontinuas – la socialista kanceliero Faymann tamen insiste ripetas la ĉiaman sinkulpigon de ĉiuj aŭstriaj registaroj, ke oni devas trovi interkonsenton kun la provinca registaro, do kun tiuj, kiuj la leĝon konsekvence malestimas kaj pri tio eĉ fanfaronas.

Estas interese, kiel senfantaziaj estas ĵurnalistoj, pridemandantaj politikistojn de la partioj, kiuj perdis la balotojn: „Ĉu vi pensas pri abdiko?” Se la politikistoj havus iomete pli da fantazio ol la diletantaj ĵurnalistoj, iu el ili povus resendi la demandon: „Ĉu iam ajn abdikis ĵurnalisto pro katastrofa senfantazio de liaj demandoj?”

Ankaŭ la verdpartianoj, kiuj ankaŭ perdis, ne sciis diri ion pli saĝan ol, ke ili bedaŭrinde ne sukcesis peri siajn enhavojn kaj temojn al sufiĉe multe da homoj... Ili ne pripensas, ke ilia plendo por samseks vivmaniero kaj por leĝpropono, kiu volas egaligi la geedzecon kun la samseksa komuna vivo en kvazaŭgeedza formo eventuale abomenigas multajn homojn. En *Die Furche* recenzo de Evelyne Polt-Heinzl pri nova komedio de Elfriede Jelinek „Die Kontrakte des Kaufmanns” (La kontraktoj de la komercisto). Mi trovas E. Jelinek por la plej enua kaj senenhava literatura aŭtoro en Aŭstrio. Ĉar certa grado de enuo, absurdeco kaj pura vortĵonglado estas neoficiala, tamen sufiĉe rimarkebla kondiĉo por atribui la nobelpremion, ŝi estas unu el malmultaj aŭstroj, kiuj ĝin ricevis. Ŝia inteligento ne atentigas ŝin pri logika malkongruo de ŝia formulo en la drama peco: „Unser Wert ist nichts, unser Wert ist nicht unser, wir haben unseren Wert abgegeben und gegen nichts eingelöst, wir haben nichts erlöst, wir haben keine Erlösung, wir haben keinen Wert, und wir haben keine Werte, unsere Werte sind nichts wert, und unser Wert ist erst recht keiner” (Nia valoro estas nenio, nia valoro ne estas nia, ni nian valoron fordonis kaj ŝanĝis pro nenio, ni nenion ellotumis, ni havas naniun savon, ni havas neniun valoron kaj ni havas neniajn valorojn, niaj valoroj valoras nenion, kaj nia valoro eĉ aparte estas neniu) – kun ŝia supozita intenco protesti kontraŭ la „perdo de valoroj” en nia epoko? Se valoroj ne troviĝas, kial postplori ilin? Se ne troviĝas valoroj, kiamaniere ŝi povis mezuri la senvaloron de la valoroj? Se oni en una frazo diras, ke konvencia mezurunuo ne troviĝas, do oni en la dua frazo ne povas aserti, ke la aferoj ne havas dimension. Aŭtoro, kiu en sia romano konstante lamentas, kial la homo ne havas kvastojn kiel fiŝoj, estus iel simile inteligenta kiel tiu, kiu negas ekziston de valoroj kaj poste dumrakonte pro tio protestas...

En la sama katolika semajngazeto tamen interesa artikolo de Philipp Harnoncourt, konata katolika sacerdoto kaj specialisto pri liturgio kaj ortodoksa eklezio: „Sind Christen – noch – Monotheisten?” (Ĉu kristanoj estas – ankoraŭ – monoteistoj?). En sia artikolo, kiu kvalite elstaras el la tuto de la gazeto, li klare agnoskas, ke en la eklezio de Romo Mariaio anstataŭante la Sanktan Spiriton eniris en la popolan imagon pri la trinitato kaj fariĝis kvazaŭ

diino, ĝia parto. Rekonante tion li devus sin almenaŭ demandi, ĉu li pagas membrokontribuon al la ĝusta klubo...

Sed, fakte ne temas pri manko de scio. Tiaj teologoj bone scias pri sia falseco!

### **Ĵaŭdo, 11-an de junio**

En Labako ni kunvenis iom antaŭ la 11-a horo, kiam la prezidanto de la respubliko Slovenio dekoris la maljunan pentriston profesoron Karolon Peĉko per ora ordeno pro disvastigo de libera penso en la tempo de komunisma diktaturo. Ĉar la sekretario de la Protokolo disponigis al mi eblecon proponi inviton por 10 personoj laŭ mia elekto, ĉar la personon kaj motivon de dekorado mi proponis, mi decidis proponi ĝenerale tiujn personojn, kiuj jam du la komunisma tempo estis kaj daŭre estas miaj politikaj kontraŭuloj. Per tiu decido mi volis signali du aferojn. Unue, ke estu vidata la diferenco inter du spiritoj, tiu de Kristo kaj tiu de la mondo; kaj due, ke homoj eventuale konsideru, ke al politika normaleco, ke ĉiu invitas ĉiam nur siajn adeptojn, havas pozitivan alternativon, ke oni povas honorige inviti ankaŭ siajn kontraŭulojn, sen ke oni forgesu pri sia starpunkto.

Apud profesoro Peĉko estis dekorita ankaŭ la poeto Antonio Pavček; tiel troviĝis en granda salono de la ŝtatestro du gastogrupoj, kiuj estis invititaj ĉeesti la solenaĵon. Tiel mi povis saluti poetojn Johanon Minatti kaj Cirilon Zlobec kaj kelkajn aliajn konatulojn el mia iama literatureska vivo.

Tiam mi renkontis mian studentkolegon el antaŭ 40 jaroj. Mi apenaŭ rekonis lin. Lia staturo, movoj, humuro kaj gestoj, ĉio-ĉi estis kiel iam, sed lia vizaĝo revelaciis jarojn, se ne jardekojn da malsano kaj sufero. Li baldaŭ mem rakontis al mi pri sia stato, sed per distanco de ne vere interesita homo, kvazaŭ temus pri ies alia vivo kaj ne lia propra. Mi estis atestanto de vera, reala stato de la homo, kiun la subinteligentaĵo de multaj, ke la vivo „tamen estas tieel bela”, ne povas obĵeti. Tiu agrabla kaj alte talentita juna ĝentlemano, kiun mi antaŭ 40 jaroj kaj pli konis, nun estas la sama animo en fremda korpo. Lia rideto estas sincera, sed tamen ne aŭtenta. Li per sia forta volo provas per rido interlipe obstini la malamikan destinon – sed ĝi, la destino, marŝas en gloro de sia nepra venko antaŭen. „Und die Biebel hat doch recht”<sup>1</sup> (Tamen la Biblio pravas), diras senvorte ankaŭ tiu ĉi viro, renkontita post 40 jaroj. Mi riskis proponon: „Ĉu vi permesas, ke en nia komunumo ni preĝu por vi?” Li surprize aprobe akceptis. Mi sentis relaksiĝon: tamen la unua fadeno, eĉ se tiel senmasa, kun Dio, estas kontaktita.

La stilo de la festeno, kiun la nova prezidento de Slovenio instalas, estas plaĉe simpla kaj digna. La sola afero, kiu al mi ne plaĉas ekstreme, estas la relative multnombra gvardio, kiu deĵoras ĉe la enirejo kaj sur la eskalo. Tio estas imitado de cirkonstancoj en Kroatio, kie la mortinta duonhegemono Franjo Tuđman instalas eĉ pli pitoreskan mezepokan gvardion. Miaj najbaroj volis min inviti al kuna tagmanĝo, sed mi jam estis invitita en la societon de la ĵus dekorita profesoro. Mi ne estis tro feliĉa pro lia dankparolado. Dum lia kolego poeto Pavček en la centron de sia parolado starigis Dion, parolante senpapere, profesoro Peĉko bedaŭrinde uzis paperon kaj tiel efikis tro formalece kaj ne povis montri sian cetere konatan kapablon ĉarmigi el sia spontaneco. Sed eĉ pli problemhava estis la enhavo de la parolado. Mi havis impreson, ke li ne perceptis bone, kial li vere estis dekorita; nome, ne pro la atingitaj rezultoj sur la kampo de kulturo kaj arto, ankaŭ ne pro lia pentra arto, sed pro lia pionira kontribuo en la urbo Slovenburgo – eldiri kaj disvastigi liberajn pensojn kaj pensojn pri libero kaj favore al libero. Anstataŭ diri kelkajn vortojn pri tio, li parolis, kvazaŭ li estus dekorita pro tio, ke li kulture agadis kaj atingis certan eĉ internacin renomon por sia urbo. Ankaŭ en lia parolado sentiĝis la kaduka efiko de la katolika pensmaniero, kiun heredis ankaŭ humanistoj kaj komunistoj, kiu honoras la homon pro liaj meritoj. Bone, ne kulopas profesoro Peĉko kun siaj 89 jaroj, kulpas ekskluzive mi mem, volinte lin tiamaniere atentigi pri la „laŭrokrono de la

---

<sup>1</sup> Titolo de la konata libro de Werner Keller (1909–1980) aperinta en 1955, kiu surbaze de arkeologio pruvas la pravecon de la bibliaj asertoj.

venko”, pri kiu parolas apostoloj Paŭlo, Jakobo kaj Petro (1 Pet 5,4), kiu estas promesita al ĉiu, kiu supervenkas la tri ĉefajn malamikojn de tiu ĉi mondo: Satanon, pekon kaj la morton. Kompreneble neniu homo povas ilin supervenki sola, sed nur per kaj kun Jesuo Kristo, kiu ilin supervenkis mem. Kun mia bedaŭro kaj tristo li montras tiel fortan imunecon kontraŭ la evangelio, ke la tuta bona intenco, ke li tiun plej altan dekoron ricevu de Dio mem, ŝajnas el homa vidpunkto – vana. Multe pli kontentiga tamen renkontiĝo kun aktorino Saša, kiu interesiĝis pri la *Prediko pri la kredo* de slovena protestanta pioniro Trubero.

### **Vendredo, 12-an de junio**

Ke la reganta nomenklaturado en Italio tiel bonvene akceptas ŝajnbeduinan teatraĵon de la libia diktatoro Gadafi, ne atestas nur pri frenezeco de la itala regnestro, sed ankaŭ pri la morala kaj intelekta debaklo de Italio kaj de Eŭropo entute. Nur ĉar la tirano supoze ne subtenas kaj iniciatas plu terorisman agadon, li fariĝis la plej bonvena gasto en la kortegoj de la dekadenca Eŭropo. Lia petroleo kaj lia tergaso malfermas ĉies pordon.

En radiatoraporto mi aŭdas, ke Slovenio akiris eŭropan prijuĝon, ke ĝia sinteno koncerne etnajn minoritatojn estas senriproĉa kaj ke ĝi insistu pri la samaj rajtoj kaj koncedoj por siaj minoritatoj en najbaraj ŝtatoj. Tio tre bone ilustras funkciadon de Eŭropa Unio: oni rigardas nur la situacion de la itala kaj de la hungara etnoj en Slovenio, kiuj fakte ĝuas ne nur plenajn rajtojn, sed eĉ privilegiojn, sed oni samtempe tute ignoras la situacion de la germana, cigana, de la sudslavaj kaj de la albana etnoj, vivantaj en Slovenio.

Kompreneble, ankaŭ Slovenio havas sian pravigon, do mempravigon. Estas evidente, ke preskaŭ neniu ŝtato povas konsekvence egalrajte trakti ĉiujn etnoj kaj lingvojn, kiuj en unuopaj ŝtatoj troviĝas. Ĉefe la ŝtatoj aplikas la internacie rekonitan kriterion, ke minoritataj rajtoj validas, se certa etno minimume dum 100 jaroj vivas relative dense sur difinita teritorio. Tiamaniere slovenoj liberiĝis de la devo konsideri etnajn rajtojn de kroatoj, serboj, bosniakoj, montenegranoj, makedonoj kaj albanoj, ja ili komencis setli la regionon de nuntempa Slovenio nur post la jaro 1918, kiam naskiĝis la Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj (Jugoslavio). Neniu sin demandas, ĉu tio estas justa solvo, ja tiamaniere la nepoj ricevas punon pro siaj avoj, ĉar ili setlis tro malfrue... Aŭ inverse, la nepoj ricevas premion pro siaj avoj, ĉar ili setlis jarcentojn pli frue. Sed eĉ per tiu maljusta kriterio Slovenio ne estas konsekvenca. Germane parolanta etno vivas sur la teritorio de nuna Slovenio dum jarcentoj, tamen ĝi kompare kun italoj kaj hungroj ĝuas eĉ ne minimuman leĝan, por ne diri praktikan protekton. La kriterio kongrua kun justeco estas tute simpla kaj klara: Neniu persono estu ĉu pozitive ĉu negative diskriminaciita pro sia persona lingvo. La problemo estas: Se ni volas tiun sole justan principon realigi, la ŝtata lingvo ne devas esti unu el en la ŝtato tradicie uzataj etnaj lingvoj. La lingvo de la ŝtato kaj publikaj institucioj devus esti neŭtrala lingvo, kiu ne apartenas specife al unu el la etnoj en la ŝtato. Sed tian solvon, kvankam ĝi estas la sola justa, volas havi nek la ŝtato nek la koncernaj etnoj, eĉ tiuj, kiuj suferas pro malprivilegiado, ne volas tion. Ili batalas nur por havi la samajn privilegiojn kiel la „ŝtatporta nacio”. Tiel slovenoj en Karintio ne batalas por ĝenerala egalrajto de ĉiuj lingvoj en Aŭstrio, sed nur, ke la slovena ĝuu la samajn rajtojn kiel la germana – sed ili ne konsideras la rajtojn de kroatoj en Karintio, de turkoj, italoj, ĉinoj, grekoj, rusoj, nigerianoj, araboj ktp. Ili preferas senĉese kaj senkoncepte plendi kaj protesti, sen proponi la solvon komplete justan por ĉiuj, kiuj loĝas en la lando. Finfine de la nesolvita interetna kaj interlingva demando bone vivas kaj gajnas lertaj advokatoj de „minoritataj rajtoj” kaj samtiel la advokatoj dela „intereso de la plimulta loĝantaro”.

### **Dimanĉo, 14-an de junio**

D-ro Arnold Metnitzer klarigis en televida programero, de kie venas la vorto „protestantoj”. La imperiestro Karlo V-a kunvokis en Speyr asembleon de reĝoj, dukoj kaj sinjoraroj por ordigi la konflikton inter katolikoj kaj evangeliataj kristanoj laŭ la instruo de Lutero. Sed ĉar la

imperiestro troviĝis en Hispanio, lin anstataŭis lia frato, Ferdinando I-a, la reĝo de Aŭstrio. Tiu kontraŭ la volo de sia frato proklamis Luteron herezulo kaj tiamaniere provokis proteston de „luteranoj”, dirante, ke koncerne kredon kaj konsciencan ĉiu staras antaŭ Dio sola. – Tute ĝusta sinteno. Sed la brila katolika klerikulo kaj psikoterapeŭto forgesas, ke *protestari* en la latina signifas ankaŭ „atestadi” – kaj tio estas la ĉefa, la esenca signifo de la protestanta movado: atesti pri Kristo!

En Vieno gastis la konata sudafrika anglikana episkopo Desmond Tutu. Li montris la tutan mizeron de la anglikana eklezio. Ĝi ne similas la eklezion de Romo nur per folkloraj kiel la liturgiaj vestoj, sed ankaŭ per teologiaj sensencaĵoj. Tiel la glorata episkopo, same kiel multaj liaj katolikaj koleoj klarigis, ke ne gravas, ĉu esti kristano aŭ islamano aŭ budhismo aŭ hinduismo – gravas esti „bona kristano”, „bona islamano” ktp. Mi devas miahonte konfesi, ke dum multaj jaroj, estinte katoliko, mi precize tiel kredis. Jesuo do eraris, dirante ke neniu venos en la ĉielan regnon krom per li (Joh 14,6). Li do eraris, kiam li dissendis apostolojn kaj disĉiplojn prediki lian evangelion al ĉiuj nacioj. – Kial do? Kaj la stranga sudafrika episkopo eraris fariĝi anglikana episkopo – li povus senĝene resti adepto de animisma (supoze) kulto de siaj prapatroj, gravas nur, laŭ lia instruo, esti „bona animisto”. Kial ne esti konsekvenca: gravas esti „bona satanisto”!

### **Lundo, 15-an de junio**

En *Kleine* raporto pri brito, kiu akiris „la plej bonan laborlokon en la mondo, konsistanta el nura feriado en societo de amatino dum duona jaro. Brito Ben Southall salajras pomonate € 12.500.-; lia labordevo estas nur en interreta blogo raporti pri siaj ferioj. Tamen li ne sentas sin feliĉa; al li mankas bovfritaĵo kaj *yorkshire-pudding*. Ankaŭ pri veteraj cirkonstancoj li ne ĝojas, ĉar la vesperfinstro por lia kutimo tro subite aperas.

La afero estas unuflanke ekstreme banala kaj stulta, kiel la turismo kaj turisma varbado povas esti. Tamen ĝi bonege ilustras la biblian veron, ke nenio krom Dio povas la homon vere kontentigi kaj plenumi.

### **Mardo, 16-an de junio**

Dum matena radiokonferenco Bojan menciis proponon de „scienculoj” en la universitato de Harvard, kiamaniere atingi veran feliĉsenton. Estas 7 punktoj: 1. Ĝusta rilato al la vivo; 2. stabila interpersona (geedza) rilato; 3. ĝusta korpovolumo ktp. La profesoroj forgesis pri kelkaj detaloj. Kia, ekzemple, estas la „ĝusta rilato al la vivo”? Kie troviĝas la normo kaj kriterio pri ĝi? – Sed iamaniere la saĝaj profesoroj tamen pravas. Ja ne temas pri vera feliĉo, sed nur pri „sento de feliĉo”. Pri vera feliĉo kaj kiamaniere ĝin atingi, predikis Jesuo sur la monto, sed liaj 8 punktoj (ne 7 kie ĉe la harvarduloj) ne trovis lokon en la radiofonia konsilo... Dum televida diskuto aŭdiĝis demando, kio mankas aŭ estas false aplikata en la ŝtata edukistemo, ke tiom da junaj homoj ne havas konvenan rilaton al la historio de la nazia periodo kaj eĉ aliĝas al tiuj, kiuj ĝin volas restaŭri aŭ almenaŭ montras certan simpatian por tiu demonorigina historia fenomeno.

La ĉiam denove ripetiĝanta demando devenas el kontraŭbiblia pensmaniero, kiu nur certan fenomenon de la malbono stampas vera malbono. Tiel ekzemple neniu venas al ideo konsterniĝi, se junaj homoj prisilentas aŭ eĉ negas la krimagojn de komunistoj dise en la mondo. De la jaro 1945 ne ekzistas plu nazia ŝtato kun nazia sekretpolico (Gestapo) kaj naziaj murdskvadronoj kiel SA kaj SS – kaj oni tamen konstante avertas pro supozata aŭ fakta reviviĝo de nacionalsocialismo. Ĝis niaj tagoj tamen daŭre ekzistas ekstreme danĝeraj komunismaj ŝtatoj kiel Ĉinio, Nordkoreujo, Vietnamio, Kubo kaj certgrade Zimbabvo kaj Bjelrusio, en kiuj oni daŭre police opresas, persekutas eĉ speciale obstine kristanojn kaj murdas supozajn kaj verajn oponentojn, liveras krimreĝimojn kiel la irana, per danĝeraj bataliloj inkluzive per segmentoj por produkti atomarmilojn – kaj neniu levas voĉon. Estas neakcepteble terorumi kaj murdi sub la preteksto de dekstra ideologio, pri kio mi plene

konsentas; sed estas tute ekster kritiko kaj skandaliĝo la samon fari sub la preteksto de maldekstra ideologio. Pretere: neniu eĉ rimarkas, ke niatempе la plej krima en la mondo estas la senbrida apliko de la meza, burĝ-liberala ideologio. Ties murdantoj ne makulas siajn manipulantajn manojn per la homa sango – ili por tion realigi luas kaj pagas subklasajn eksterleĝulojn.

Finfine, por rifuti la krokodillarmojn el politika kaj pedagogia tendaroj: Kiu sisteme enkapigas al junaj generacioj la vere danĝeran instruon, destilitan el darvinismo, marksismo kaj niĉeismo, laŭ kiu al ĉiuj homoj kaj nacioj supera kaj absoluta instanco, aŭtoritato kaj kortumo ne ekzistas kaj la homo ne estas kreita laŭ la supera kaj sankta bildo de tiu instanco, kiun la kristanoj same kiel judoj nomas Dio, sed estas hazarda kaj senintenca, tiel ankaŭ sensenca produkto de hazardaj procesoj en la senspirita materio, tiu bonvolu ne miri, ke junaj homoj baldaŭ komencas konduti kiel nure materia fenomeno sen spirita orientiĝo kaj valorsistemo. En tiaj „procesoj”, tiel la sataneska ideologio, la „ekzistolukto” estas la ĉefa motoro de la „evoluo”. Ĉu do strange, ke ĝuste la ideologoj de nacionalsocialismo kaj komunismo kun tia entuziasmo alkraciĝis al la ideologie profanita doktrino de Darveno (la origina neprofanita en sia esenco eĉ por dikeco de eŭglena membrano ne estas pli bona!)? Unu el ĉefaj aŭstriaĵ biologoj, la nobelpremiito Konrad Lorenz, estis konvinkita nazio kaj faris siajn esplorojn sub egido de la Hitlera reĝimo kaj ĝia financa subteno. Stalin adiaŭis de la ortodoksa kredo kaj eklezio, kvankam studento de teologio kaj aspiranto je sacerdota posteno, postkiam li legis la plej faman kaj unuan libron de Darveno: La origino de la specioj el la jaro 1859. Se Darveno pravas, tiam sendube pravus ankaŭ Hitler kaj Stalin! Denunci novhitlerismon kaj samtempe per ŝtataj rimedoj al ĉiuj generacioj de gelernantoj kaj studentoj altrudi darvinismon, kiu estas la utero de la nazia kaj komunisma antropologio, signifas arte produkti kaj zorge flegi skizofrenion je kostoj de publika buĝeto, eĉ pli, je kosto de tiel misedukitaj junaj generacioj.

Sekvis debato en aŭstria parlamento, praktike pri la sama temo kaj pri la sama stulteco. Ĉiuj parolas pri „bona edukistemo”, sed neniu, inkluzive laŭnome kristanajn deputitojn, scias diri, kia estas aŭ estu „bone edukita homo”. En la germana lingvo troviĝas inter andragogoj bone konata diraĵo: „Bildner, bilde dich selbst!” (Edukisto, eduku vin mem). Oni povus analogie diri: Deputito, eduku vin mem! – Sed kiamaniere la kompatindulo tion faru, opiniante, ke la vera origino kaj do naturo de la homo estas – la besto! Ĉu tiu deputito vere opinias, ke „eduki” homon estas pli malfacile ol ĝin „produkti”? Kion do la eduko povus aldoni? Postulo de eduko estas esence biblia postulo kaj kontraŭdiras la doktrinon de evoluciismo. Tiuj homoj volas ion principe kontraŭdiran kaj tiel neblan. Havi homon, edukitan laŭ la biblia modelo de al Dio plaĉa estaĵo, kiu tamen kredu, ke la Biblio estas kolekto da palestinaj fabeloj...

Iu sociologo raportas, ke laŭ la esploroj kaj kalkuloj de lia instituto ¼ da aŭstroj preferas havi „fortan viron” anstataŭ demokration, eĉ se tio estus militista puĉisto.

Ĉu strange? La demokratia sistemo okupiĝas pri ĉio alia, kio la ŝtatan povon tute ne koncernas, nur ne pri la kerna tasko de ĉiu ŝtato: pravigi la forprenon kaj anstataŭon de persona suvereneco, kies instrumento kaj simbolo estas armilo por povi defenti sian vivon kaj netuŝeblecon kaj siajn proksimulojn, per ŝtataj instancoj, kiu tion sukcese kaj senprokraste efektivigu. Nun la civitanoj povas al kompleta fiasko de la demokratia ŝtato kiel garantio de ordo kaj paco reagi, krom se kristano, kiu rezignas pri sia sekureco kaj ne havas iluzion, ke la ŝtataj instancoj lin gardos kaj protektos, nur per du manieroj: aŭ reiri en la praĝangalan staton de anarkio, prenante la justecon kaj la glavon, kiu ĝin sankcias, en proprajn manojn – aŭ voki novan tiranon, kiu almenaŭ por certa tempo povas lin efike protekti kontraŭ rabistoj, ŝtelistoj, murdistoj kaj batantoj. La antikva „politika horloĝo” de Aristotelo daŭre perfekte funkcias.

Ĉar la demokratioj troigis en la direkton de anarkio, do tre verŝajne, se Dio ankoraŭ disponigos tempon, baldaŭ sekvos nova tiranio. Nur unu mezurunuo sur la montroplato de tiu horloĝo por ĉiam malaperis. Inter la tiranio kaj demokratio devus troviĝu periodo de aristokratio, la regado de la plej bonaj, plej noblaj. Tio jam delonge ne okazas plu. Kaj la

homo ĝis la fino de la eono endolos nur plu inter tri tre malbonaj sistemoj: demokratio, kiu fakte tendencas al ohlokratio, anarkio, kiu kiel memstara sistemo ne povas ekzisti, kaj tiranio, el kiuj la unua estas pli malbona...

Finfine: Ĉu la demokratio estas la sistemo laŭ Dia plaĉo? Laŭ la eldiro de Jesuo al Pilato tute certe ne. Registaro en demokratio devas plenumi la volon de la popolo kaj ne la volon de Dio. La Biblio klare diras, kio estas la volo de la popolo: Liberigu Barabaon kaj krucumu Kriston!

### **Merkredo, 17-an de junio**

Mallonga vizito ĉe „amiko”, espereble mia lasta. Kiel ĉiam, li komencis grumbli kontraŭ sia eksa amatino, ĉar ŝi lin insiste telefonvokas kaj spite al sia kruda nefidelo al li daŭre provas lin reimpliki en sian vivon. Li konstante ripetas, ke li ne povas kompreni ŝian obstinon, kvankam li, kiel li asertas, al ŝi tre klare diris, ke la rilato ne povas plu ekzisti. Nu, spite al liaj plendoj, li ŝin regule vizitas kaj ĉagrenas. Sed li ne toleras, ke oni al li tion diru. Kaj mi faris ĝuste tion. Mi diris, ke ŝi estas samtiel obstina kiel li, ja ankaŭ li ne ĉesas ŝin vizitadi kaj tiel nutri ŝian esperon, ke ili rekomencu la malĉastaĵon.

Li raportis ankaŭ pri sia negrava stratakcidentito. Dumveture sonoritis lia poŝtelefono kaj li provis ĝin tiri el sia poŝo. Tiel li preskaŭ koliziis kun aŭto antaŭ si; sed kiel lerta profesia ŝoforo li tamen sukcesis stiri la veturilon dekstraflanken – sed tie li renversis kaj rompis informtabulon kun portkonzolo, kaj la batamortizanta profilo ĉe sia aŭto. Bone, li estis tiom honesta, ke li iris al la polica stacio denunci sian faron. Sed li ne estis sufiĉe honesta por diri, kial kaj kiamaniere la akcidento okazis. Telefoni en aŭto sen aparta konzolo, kiu liberigas manon por ambaŭmana stirado, estas en Slovenio same kiel en Aŭstrio malpermesita. Sed tio ne estas sufiĉe. Li kun plen seriozo rakontas, ke finfine por la akcidento responsas lia eksamatino, kiu lin telefonvokis... Kiam formortas la fido, ne sekvas morte nur la moralo, sed ankaŭ la seksa karaktero – la vireco. Aŭ, se temas pri ino, la dameco.

Kiam mi provis nur tre tenere atentigi lin pri tio, ke li evidente ne faras ion alian ol lia konstante kritikata eksamatino, ĉe kiu li daŭre frekventas, kvankam li diras, ke li neniam revenos al ŝi, li tuj reagis agrese, eĉ riproĉe, kia amikeco tio estas. Kiam li sin unuafoje klare esprimis, ke la Biblio estas falsifaĵo, mi decidis ĉe mi ĉesigi miajn vizitojn.

Johano en Slovenburgo montris al mi gazetan komenton de Simona Toplak, kiu kritikis la slovenan ŝtatestron pro liaj vortoj, per kiuj li provis pli milde ol estus ĝuste, prezenti mensogon de la ministro Golubič – tute hazarde apartenanta al la sama politika flanko kiel la ŝtatestro – nomante lian (publikkoncernan) mensogon „eraro”. Ĝis ĉi tie ŝi pravas, sed ŝi ĉesas pravi dirante ke la afero, pro kiu Golubič mensogis – kaŝe partopreni ĉe iu fremdlanda entrepreno kiel akciisto kaj hejme blufi sociale solidaran maldekstrulon – estas pli grava ol la mensogo mem. Tio povas eventuale esti tiel en la ordo homa, sed certe ne en ordo Dia. Fine de sia artikolo ŝi sendube montras, ke ŝia valor sistemo estas precize la sama kiel tiu de s-roj Golubič kaj d-ro Türk: „Ker sem za pravico do splava, ker sem za kontracepcijo, ker nisem homofobična, ker mislim, da je treba šibkejše zaščititi, ker sem za libertarnost, volim levico.” (Ĉar mi staras por la rajto je aborto, ĉar mi aprobas protektadon kontraŭ la koncipito, ĉar mi ne estas kontraŭ homoerotiko, ĉar mi opinias, ke oni devas protekti pli malfortajn, ĉar mi pledas por liberecoj, mi balotas por maldekstro.) Nur pretere dirite: fari aborton, do mortigi la plej malfortan homan estaĵon – ĉu tio estas la maldekstre retorike proklamita „protektado de la malfortaj”?

Sed mi samtiel ne povis konsenti kun la rimarko de Johano, ke mensogo, murdo, ŝtelado ktp. estas io normala kaj atendebla ĉe la maldekstra tendaro. Mi bezonis tro multajn vortojn, ke por la maldekstro validas la sama kaj plena dekalogo kiel por la dekstro kaj por la mezo. La ignoro de ĝi ne estas la specifo de la maldekstro, kiel same ne de la dekstro, sed de la ne konvertiĝinta kaj ne jam novnaskita homo maldekstre, dekstre kaj meze, tute sengrave pri la flanko! La homoj laŭ la biblia rastro ne estas dividitaj je maldekstro kaj dekstro, sed je perditeco kaj saviteco! La dekstra rabisto en la evangelio laŭ Luko 23,40-43 ne estis savita,



ĉar li pendis sur sia kruco dekstre de Jesuo, sed nur ĉar li agnoskis al Jesuo, ke li pekis kaj meritas mortopunon, kaj ĉar li kredis, ke Jesuo lin povas rememori en la ĉielo kaj petis lian savhelpon. Tiel la Biblio – ĉio alia estas la „homa saĝo”, kun kiu la Skribo ne havas komunecon.

### **Ĵaŭdo, 18-an de junio**

Hieraŭ vespere televida raporto pri nekredebla simpla vilaĝanino Mukhtar el Mervalao en Pakistano. Kiel knabino ŝi estis kruele perfortita kaj mistraktita de ses viroj el konata vilaĝa klano. Por „savi la honoron” de sia patro. Tiajn terurajn fruktojn kreskigas la spirito de islama religio kaj el ĝi inspirita tradicio. Sed la knabino, kvankam neskribipova, denunciis la krimulojn ĉe la polico kaj rulis la aferon spite al cirkonstancoj kaj korupta registraro tiel, ke ŝi akiris tutmondan reputacion, fondis en sia vilaĝo lernejon, poste eĉ gimnazion, kaj nun ŝi mem frekventas ĝin. Sed ŝi ne estas liberigita. Mankas Jesuo kaj lia savanta graco.

### **Ĵaŭdo, 25-an de junio**

Hieraŭ ĉe d-ro K. P. en Slovenburgo. Jam en Labako li diris al mi, ke li havas du demandojn rilate kredon. Tiel mi volis lin viziti, por ke li ne restu sen adekvata respondo. Sed unue mi devis manĝi kompletan tagmanĝmenuon, gasteme prezentita de lia edzino. Estis tre bona terpoma supo kun kantareloj, rostitaj porkripoj kun rostitaj terpomoj, salato kaj biskvito kun kremo. Ĉio-ĉi, kompreneble, en viviga akompano de griza pinoto.

Postdeserte ni komencis preparoli la aferojn. Unue mi esprimis bedaŭron, ke la dekorita profesoro Peĉko ne registris – bone, tamen 88-jaraĝa! – pro kio li estis dekorita de la ŝtatestro kaj en sia dankparolado prezentis liston de siaj pentristaj kaj kulturiniciataj meritoj, por kiuj li jam antaŭe ricevis rekonon kaj dekormedalojn. Estas interese. Kvankam li ne estas katoliko, li tamen posedas tipe katolikan menson: valoro de meritoj!

Sekvis ambaŭ demandoj pri la kredo. Unue: „Bone, vi kondamnas marŝalon Titon, ĉar li post la militfino donis ukazon likvidi la redonitajn skvadronojn de serba, kroata kaj slovena kontraŭpartizanaj resp. kontraŭkomunismaj milicoj – kaj tiu ago koncernas nur tiun ĉi surteran vivon. Sed kion diri pri Kristo, kiu kondamnos verŝajne miliardojn da homoj je eterna kaj tortura pereco?”

Mi dankis pro lia demando kaj provis respondi unue per homnivela komparo. Supoze ke mortpuno en Slovenio ankoraŭ ekzistus... La provinca kortumo en Slovenburgo kondamnos krimulon, kiu murdis, rabis, perfortis ktp. je morto sur pendumilo. Alikaze la provinca kortumo en Mariburgo kondamnos je morto sur pendumilo homon, kiu oponus la reĝimon kaj disvastigus reĝimkritikan literaturon. Ĉu tio estus komparebla? Karolo konsentis, ke certe ne. Bone, mi kontinuis. Vi volas kompari la agon de Kristo, kiu kondamnos precize nur tiujn, kiuj vere rompis la Dian leĝon (kion faris ni ĉiuj) kaj ne estis pretaj pro tio penti, dum Tito ne eldiris kondamnon kiel sekvo de kortuma proceso, en kiu estus konstatita eventuala kulpo aŭ eble ankaŭ senkulpo, sed simple eldiris ukazon super la tuta kategorio de loĝantaro, inkluzive bebojn kaj oldulojn, batalantojn kaj civilulojn, virojn kaj virinojn: Likvidu! Ĉu tio ĉi por vi estas komparebla aŭ eĉ sama afero? Li konsentis, ke ne.

Mi kontinuis: Laŭ mia kaj ĝenerala historia scio Tito al neniu donis eblecon penti, konvertiĝi kaj ricevi savon. Tute alie ĉe nia Sinjoro Jesuo Kristo. Li la unuan fojon ne venis en tiun ĉi mondon por ĝin kondamni (Joh 3,17), sed por ĝin savi. Nur kiam li venos la duan fojon, li venos kiel la reĝ kaj la juĝisto por super ĉiu eldiri verdikton. Ĝis tiu estonta momento ĉiu homo havas ŝancon sin deturni de sia peko kaj Satano kaj tiel ricevi savon kaj garantion ne esti juĝota (Joh 5,24). Ĉu ekzistas komparo? – Ne, konsentis Karolo.

Lia dua demando koncernis la problemon pri novnaskiĝo. „Kion oni devus fari por naskiĝi denove?” – Mi ĝojis, ke li starigis praktike la saman demandon, kian la fariseo Nikodemo starigis al Jesuo.

Mi respondis, ke la homa saviĝo konsistas el du agoj. Homo agas per pento kaj konvertiĝo – Dio reagis per novnaskiĝo kaj elverŝo de la Sankta Spirito. Por naskiĝi denove la homo povas kaj bezonas fari nenion. Ĝi estas la faro de Dio ekskluzive.

Kun espero, ke Karolo post sia surtera vivo ne troviĝos inter tiuj, kiuj ricevis verdikton de Kristo, sed inter tiuj, kiujn Kristo vokos el la mortintoj por dekori ilin per la krono de venko kaj de eterna gloro, mi adiaŭis en ĝojo, ke li starigas demandojn pri la kredo, kiaj en nia tempo ne estas kutimaj.

Posttagmeze ĉe Miriam. Ni parolis pri negravaĵoj, ŝi skandaliĝis pri aferoj, publikigitaj en la skandaleca gazetararo. Ŝi komencis paroli pri virino, kies juna filo subite mortis. Ŝi komentis, ke perdi infanon certe estas la plej doloriga afero, kiu povas okazi. Mi respondis, ke certe tia perdo apartenas al la plej dolorigaj travivaĵoj, tamen tio ne okupas la pintan lokon. Ŝi konsterniĝis: „Neniu pli amas ol patrino sian infanon, kaj tial neniu doloro estas pli granda ol se la infano mortas antaŭ ĝi povis vivi sian plenan aĝon.”

Mi respondis per demando, ĉu la statistika fakto, ke jam preskaŭ ĉiu tria koncipita infano, de medicinistoj mortigita laŭ postulo aŭ konsento de propra patrino (kompreneble ankaŭ de patro kaj aliaj familianoj), estas por ŝi konvinka pruvo por ŝia eldiro? Mi ne scias kaj ankaŭ ne volas scii, ĉu eventuale ŝi mem iam tion faris, sed ŝi aldone konsterniĝis ĝuste en tiu senco. Sed mi kontinuus: „Se la onidira amo de la patrinoj estus tiom granda kaj ilia doloro pro la perdo de ilia infano tiom forta, mi supozas, ke tiukaze la patrinoj en la tempo, en kiu ilia infano vivas, ĝin traktus tute alie ol ili praktike faras.”

Ŝi intervenis: „Ho, mi scias, vi pensas nur pri tiu alia mondo, ĉio alia por vi ne havas plu valoron...”

Mi respondis, ke perdi infanon por tuta eterno logike devus kaŭzi senkompare pli fortan zorgon kaj suferon ol perdi ĝin nur portempe. Do mio ŝin demandis, en kio ekzemple manifestiĝas ŝia amo kaj zorgiĝo por ŝia filo, kiun homoj alte aprezas pro lia solida sindonemo en profesio kaj pro lia helpopreteco. Ŝi respondis, ke ŝi deziras al li ĉion bonan kaj daŭran feliĉon. Mi obstinis: „Konkrete?” Ŝi: „Ke ĉio restu, kiel estas, ke neniu akcidento, katastrofo aŭ malsano al li okazu.” „Nu,” mi respondis, „bela patrina amo: restu liaj sanproblemoj, kiaj ili ĵus estas; daŭru lia aĝprogreso kun nepra korpa kaj intelekta malprogreso; proksimiĝu la tago de lia nepra morto – kaj post tio la momento de la verdikto elbuŝe de Kristo: ‚Mi ne konas vin...’, kies nepra konsekvenco estas la poreterna pereco. Vere kormova patrino amo...”

Ŝi ripetis riproĉon, ke mi pensas ekskluzive pri la transcenda mondo, en kiun ŝi ne kredas. „Ne temas pri tio,” mi diris, „ĉu vi en tion kredas aŭ ne, nun unue temas pri tio, ke ĉio, kio iam ĉesos ekzisti, kaj tio estas ĉiuj aferoj de tiu ĉi mondo, ĉifine signifas morton. Tiel, se vi deziras al via filo ion ajn nur ĉimondan, vi fakte deziras al li nur diversajn aspektojn de la morto. Tial mi, kun pardono, ne povas kredi la disvastigatan miton pri tiom profunda amo de patrinoj al iliaj infanoj...” Ŝi gapis. „Vi mem vidas, Miriam, en kia embaraso troviĝas gratulanto, kiu preparas iel malidiotan gratuldiraĵon al pli altaĝa homo, serĉante malpli stultan formulon inter ‚multajn jarojn’ – kvankam evidentas nur tre mallonga aĝperspektivo – kaj ‚kion vi mem volas’. Tute alie, se kredanta persono gratuldeziras al same kredanta persono kaj ne bezonas prikaŝi la realan staton de la afero, do la tre verŝajnan baldaŭan definitivan adiaŭon de tiu ĉi mondo. Tiu povas sincere deziri la revidon kaj poreternan komunecon ĉe Jesuo Kristo, la komuna Sinjoro de ili ambaŭ! Vere ami povas nur tiu, kiu povas sincere al sia amata homo deziri eternan vivon ĉe Dio – ĉiuj aliaj devas pli malpli blufi.”

### **Sabato, 27-an de junio**

En la karintia radioprogramo mi aŭdis, post tiom da jaroj, saĝan komenton pri la tiel konata kaj ĉiam denove citita stultaĵo, ke la muziko estas la internacia lingvo de la homaro. La idiotaĵo originas el la anekdota eldiro de la aŭstra komponisto Haydn, kiu responde al demando, kiamaniere li komunikas en Anglio, kien li estis invitita doni koncertojn, diris, ke lian

muzikon komprenas la tuta mondo. La ĉijara direktoro de la karintia muzikfestivalo „Karintischer Sommer” muzikologo kaj mem komponisto Thomas Daniel Schlee diris: „Die Musik ist keine internationale Sprache!” (La muziko ne estas la internacia lingvo.) Kaj li eksplikis, ke ankaŭ la muzikon komprenas nur eta elito de tiuj, kiuj tiun specifan lingvon lernis, kaj cetere neniu. Kompreneble, kompreni la muzikon ne estas la sama afero ol ĝin ĝui. Finfine oni povas ĝui aŭskultante la parolon en la franca, hispana aŭ rusa, sen kompreni, kio estis parolita. Same ĉe la muziko. Kiel kontentiga sperto iam alternative aŭdi parolon de racia homo, kiu ne ripetas blinde idiotaĵojn de la mondo. Tamen: de kie venas la bezono tiun eldiraĉon tiel obstine ripeti? La homa animo en sia profundo tamen tute bone scias, ke komuna lingvo estas bezonata, ke ĝi estus grava helpo al homoj el ĉiuj nacioj. Estas nur unu problemo. Pro ĝenerala egoismo preskaŭ neniu, praktike neniu krom la esperantistoj, estas preta kreditsubteni la solvon de tiu problemo per sia kontribuo, kiu ne tuj promesas profiton. Kaj por kontentigi sian konsciencon, kiu komunan lingvon tamen postulas, oni estas tuj preta uzi malraciajn metaforojn por ŝajnigi ekziston de la solvo.

Mi parkigis mian aŭton sur la sama loko kiel ĉiam. Kiam mi revenis de nia biblia horo en Villacher Straße, mi sur la frontvitro vidis falditan paperon. Min surprizis la enhavo: iu fraŭlino J. K. mesaĝis, ke ŝi, parkigante sian skuteron, iomete koliziis kun mia aŭto, kiu tie staris. Ŝi skribis sian telefonnumeron, per kiu mi povas ŝin atingi.

Kiam mi ŝin hodiaŭ vokis, mi unue gratulis al ŝi po ŝia honesto kaj trankviligis ŝin, ke la okazinta kolizio tute ne estas problemo, ja temas pri 13-jara ladkesto. Poste mi demandis, ĉu mi rajtas ŝin demandi pri iu persona afero, pri kiu normale ne estas dece demandi al nekonata persono. Post ŝia rideta akompanita aprobo mi diris: „Pardonu, sed ĉu vi estas kristano?” Ŝi ridete respondis: Jes, mi estas. Mi ne arogis pli detale demandi, ĉu vere novnaskita aŭ nur laŭnoma en katolika aŭ luterana senco. Mi nur diris: „Vi troviĝas sur bonega vojo, bonvolu kontinui, mi deziras al vi benitan kaj belan tagon.” Mi salutis kaj demetis aŭdilon, ne konante ŝin, sed ekkonante ŝian noblan agon, ne kutiman en nia tempo.

En *Kleine* mi legis festparoladon de verkisto Josef Winkler el Klaŭdiforumo okaze de „Bachmannliteraturpreis” (atribuado de la premio „Ingeborg Bachmann”) en Klaŭdiforumo. Kvankam la festparolisto ne estas sen certa literatura talento, li ne estis ekstreme originala. En sia pamfletparolado li riproĉis al la politika gvidantaro en la provinco Karintio, ke ĝi elspezas multan monon por sporto kaj aliaj eventoj, sed preskaŭ nenion por subteni bibliotekojn kaj la libron ĝenerale. Li menciis, ke Klaŭdiforumo estas la nura urbo en la okcidenta kaj meza Eŭropo, kiu ne havas urban bibliotekon. Nu, tio ne estas ĝuste la vero. Fakto estas, ke antaŭ proksimume tri jardekoj la tiama urba biblioteko, troviĝinta en la antikva konstruaĵo de la nuna malnovkatolika kapelo, estis translokigita kaj enkludita en la universitatan bibliotekon. Apud tio ĉe Arbeiterkammer (komoro por laboro) tuj ĉe la stacidomo kaj apud la naskiĝdomo de la fama aŭstra verkisto Robert Musil troviĝas sufiĉe ampleksa publika biblioteko. Riĉa biblioteko, malfermita al ĝenerala publiko, troviĝas ankaŭ en la katolika dioceza domo en Tarviserstraße. Troviĝas ankaŭ kelkaj lokaj, kvartalaj bibliotekoj dise en la urbo. Ĉe Caritas disponiĝas ebleco je simbolpreza aĉeto de multaj interesaj uzitaj libroj. Troviĝas ankaŭ aliaj lokoj por tre oportune aĉeti librojn. Ĉiujare okazas en la centro de la urbo bazaro, kie oni povas aĉeti librojn po € 1,-- je kilogramo. Kaj por ne forgesi: Ĉu ne troviĝas absolute unua respondeco por prizorgi al si librojn per persona aĉetado de ĉiu urbano mem? Mi ĉiam salajris modeste, sed mi neniam havis problemon, ke al mi mankus libroj: slovenaj, esperantaj, germanaj, anglaj, serbaj kaj kroataj... Finfine aŭstrianoj estas la tria plej riĉa nacio en Eŭropo. Sed tiu memkompreneblaĵo por la protestanta menso estas fremdvorto por katolike, do kolektivece formatiĝinta menso. Kaj finfine: Ĉu on apud la Biblio nepre bezonas milojn da libroj, por kiuj devus garantii kaj pagi la ŝtato?

Hieraŭ mi veturis al Labako por renkonti amikon. Unue ni interŝanĝis librojn. Mi kunportis por li du librojn pri Trubero, por ke li povu bone prepari sian prelegon pri tiu slovena evangeliisto, en Triesto, kie Trubero sub la egido de la episkopo Bonomo konatiĝis kun

evangeliaj veroj, kiel ilin denove malkovris la protestantaj kaj reformitaj kristanoj de la 16-a jarcento. Mi disponigis ankaŭ stokon da libroj de Plock *Jesuo estas la vojo* por la kroata komunumo en Umago.

Ni parolis pri la aferoj kaj personoj, kiuj en komunumoj iomete ĝenas – sed kial ni ne parolis pri senmezura feliĉo, ke Dio nin elprenis el la mondo kaj Jesuo pagis ĉiujn ŝuldojn de ni? Tiel mi ne starigis al li denove la demandon, kiun la etiopia eŭnuko mem starigis al si: „*Kio min malhalpas por esti baptita?*” (Ago 8,37). Mi havis impreson, ke mia amiko atendas kaj postulas de la Eklezio de Kristo pli ol ĝi povas esti kaj doni. Ni ne forgesu: ĝi estas la *korpo* kaj ne la spirito de Kristo! Li eldiris la tipe katolikan sintagmon, ke la eklezio estas samtempe „sankta kaj peka”. Certe ĝi estas sankta, ĉar fondita kaj en tuta eono gvidata de Kristo, kiu la unua estas sankta – sed ĝi ne povas esti peka, ĉar la senpeka korpo de Kristo! Ĉu la korpo de Kristo povas esti peka? Certe ne. Unuopaj eklezianoj estas samtempe sanktaj kaj pekaj, sed ne la Eklezio, se tems pri tiu, kiun fondis Jesuo Kristo. Tial oni ne postulu, ke en la komunumo troviĝu kistanoj kun jam apoteozigitaj korpoj!

### **Dimanĉo, 28-an de junio**

Mi esperis posttagmeze partopreni la kunvenon de gefratoj sur la bieno de Johano kaj Mariaio super Prevalje. Mia edzino promesis viziti sian amikinin, tial mia foriro ne ĝenus. Sed „tute hazarde” mia edzino ricevis inflamon en orelo kaj ne povis forveturi. Tiel ankaŭ mi restis hejme.

Ĉe la diservo predikis Marjan Kac el Podklošter/Arnoldstein, cetere sloveno el Mariburgo. Li elmigris kun gepatroj al Germanio estinta 6-jaraĝa. Tiel ne estas mire, ke lia germana lingvo estas pli senriproĉa kaj riĉa ol lia gepatra slovena lingvo. Lia prediko estis tre freŝa kaj lia apero aŭtenta kaj simpatia. Mi havis nur unu rimarkon. Li citis la sentencon de la germana verkisto Erich Kästner: „Es gibt kein Gutes, außer man tut es!” (Ne troviĝas io bona, krom se oni ĝin faras.) Tiu ĉi tipe katolika frazo, kiu intencas instrui agademon, homan entreprenemon, ne estas kongrua kun la biblia vero. La absoluta plimulto de bonaj aferoj estas kreita de Dio kaj ne bezonas atendi homan agadon kaj faradon. Kaj ankaŭ la por nia raso plej grava faro, savo de la homoj, estis farita de Dio mem, fariĝinta homo, Jesuo Kristo! Cetere Jesuo mem bonege komentis paroladon pri la „bono” (Mat 19,17).

Ĉekafe li rakontis al mi el sia vivo, kiamaniere li renkontis Jesuon kaj kiel li nun laboras sur la evangelia kampo.

Nia temo estis ankaŭ la frenezeco de la mondo, kiu denove manifestiĝas okaze de la morto de la triviala usona populara kantisto Michael Jackson. Milionoj adoras lin kvazaŭ dion – kelkaj tion ankaŭ klare esprimas. Tamen, ankaŭ tiaj en si abomenaj fenomenoj enhavas ion bonan, eĉ se tio ne estis intencita: ili konfirmas kaj atestas, ke la Biblio pravas...

### **Lundo, 30-an de junio**

Kian valoron havas la festado de „Paŭlojaro” enkadre de la romkatolika eklezio, atestas la frazo, subskribita de J. Po. en *Družina* sur la p. 3: „Ko Pavla ne sprejmejo v skupnosti, se Pavel umakne v puščavo. Doživlja, da ga ne razume niti Jezus. Umakne se puščavo.” (Ĉar Paŭlo ne estis akceptita en la komunumo, Paŭlo retiriĝas en dezerton. Li travivas, ke nek Jesuo lin komprenas. Li retiriĝas en dezerton.). Fascina teologio. Dio Jesuo Kristo „ne komprenis” sian apostolon Paŭln, kiun li mem elprenis el la mondo kaj lin instruis pri ĉio, kion Paŭlo bezonis kiel apostolo. Ne temas nur pri herezo koncerne la Biblion, sed ankaŭ pri stulteco surfone de elementa logiko...

Aloizo en sia kolumno *Credo* alparolas nove konsekritajn katolikajn sacerdotojn en Slovenio. Li diras al ili multajn vere bonajn konsilojn, speciale tiujn pri la pliparte pagana karaktero de la slovena loĝantaro: „To že veš, da ne začenjaš svojega poslanstva v neki idilično krščanski Sloveniji, ampak v Sloveniji, ki se iz dneva v dan bolj poganizira z Evropo vred.” (Vi tion jam scias, ke vi ne komencas vian mision en iu idilia kristana Slovenio, sed en Slovenio, kiu

fariĝas per ĉiu tago pli pagana, inkluzive Eŭropon.) – Nur marĝena rimarko: Slovenio, samkiel Eŭropo, *neniam* estis vere kristanaj landoj, sed ĉiam paganaj, ja laŭ geografio ili apartenas al la mondo – kaj tiu, laŭ la vorto de Dio, apartenas al la domeno de Satano kaj estas en sia esenco pagana!

Sed ne tiel marĝenan rimarkon mi havas koncerne tiun ĉi frazon: „Ne imej kompleksov zaradi medvojne dobe.” (Ne havu kompleksojn pro la dummilita tempo.) Nu, persone certe ne. La „herooj” de ambaŭ tendaroj, de la klerikal-faŝisma kaj de la bolŝevik-komunisma estas jam preskaŭ ĉiuj mortaj. Sed daŭre vivas, agadas, instruas kaj propagandas ambaŭ tendaroj de la intercivitana milito en la Provinco de Labako, kiel nomiĝis la centra parto de Slovenio, okupita de faŝisma Italio kaj en 1943 post la kapitulaco de Italio, de nazia Germanio. La ideologoj de la komunisma tendaro eraris kaj blufis, do mensogis, dirante, ke ĉiuj tri okupatoroj: la germana, itala kaj hungara kondamnis la slovenan popolon je morto kaj nur la militista ribelo de partizanoj kaj paralele altrudita revolucio fare de KPS helpe de la sekreta inform. kaj likvidservo VOS (Varnostno obveŝĉevalna služba / Sekurecinforma servo) povis savi la slovenan popolon de ĝia okupatora kaj socisistema sklaveco. Fakte neniu okupatoro kondamnis slovenojn je morto, eĉ la nazi-germana ne. Estis nur unu nacio, vere kondamnita je morto, la juda! Slovenoj estis en multaj okazoj persekutitaj – pliparte pro partizanaj atakoj, atencoj de VOS kaj aliaj terorismaj kaj subversiaj agoj; ili estis en Stirio kaj Karintio elpelitaj en Kroation kaj Serbion; multaj estis punpafitaj kiel ostaĝoj pro atencoj kaj sieĝatakoj de VOS kaj partizanaj taĉmentoj; multaj pro samaj kaŭzoj, pro vera aŭ false denunciita kooperado kun partizanoj senditaj en pereigajn koncentrejojn, el kiuj multaj ne revenis – sed estas pura demagogio aserti, ke slovenoj estis mortkondamnitaj, same kiel estas pura demagogio aserti, ke partizana movado la slovenan popolon savis de pereigo kaj ĝin liberigis. Post la fino de la milito la slovena partizana militistaro estis dissolvita, slovena lando ricevis novan okupatoron, la novjugoslavian. Tiu nova okupatoro almenaŭ dum certa tempo subjektive verŝajne eĉ ne estis kaj ne intencis esti okupatoro, ja ĝi argumentis per intenco „liberigi” ĉiujn naciojn en la federacia kadro de Jugoslavio kaj eĉ fari ilin „frataj” nacioj. Sed objektive la jugoslavia armeo de Tito havis okupatoran karakteron. Ĝi ankaŭ en Slovenio malpermesis uzon de la slovena lingvo en la armeo, kvankam la slovenaj partizanoj uzis dummilite la slovenan kiel ĉiutagan kaj komandan lingvon. Anstataŭ tio ĝi al ĉiuj slovenaj soldatoj altrudis la serb-kroatan kiel devigan lingvon en la armeo. En la jugoslavia popolasemblejo (skupština) formale ĉiuj lingvoj de la unuopaj respublikoj estis egalrajtaj, tamen praktike pro la politika premo kaj forcita estoso preskaŭ senescepte estis uzita nur la serb-kroata. En la viena parlamento de iama aŭstro-hungara monarkio ili povis paroli en propra gepatra lingvo! Ankaŭ ĉiuj federaciaj instancoj kiel la registaro kaj ministerioj funkciis ekskluzive en la serbkroata, eĉ se ministro aŭ altoficisto estis sloveno aŭ makedono aŭ albano. La okupacia karaktero de Jugoslavio manifestiĝis ankaŭ en ekonomia ekspluatado de Slovenio favore al gigatomaniaj nerentabilajn investoj en la suda parto de la federacia ŝtato kaj fanfarona helpo al afrikaj kaj aziaj landoj, per kiu Tito „subaĉetis” ilian partoprenon en virtuala imperio de „senaliancaj landoj”, kies cezaro Tito estis. Okupatora karaktero de la jugoslavia ŝtato kaj armeo montriĝis ankaŭ en la fakto, ke tiu „liberiga” armeo eĉ krakplutonon ne elpasis por reteni jam „liberigitajn” provincojn Karintio kaj Triesto kun ĉirkaŭregiono. Ke temis pri vera okupacio, pruvas ankaŭ la fakto, ke ne la civila kortumo en Slovenio, sed la polico de la jugoslavia armeo arestis en la jaro 1988 tri junajn slovenojn: Janša, Tasič, Zavrl kaj slovendevenan oficiron Borštner. La arma kortumo procesis kontraŭ ili meze de Labako en la serb-kroata lingvo. Tiom do pri la fifaroj kaj mensogoj de la maldekstra, partizana kaj komunisma flanko – kaj oni povus surlistigi da samspeca materialo por cent kaj pli dikaj libroj.

Nun pri la dekstra, duone klerikal-faŝisma kaj duone nacionalsocialisme orientita tendaro de la kontraŭkomunista milico „domobranci” (hejmdefendantoj). Ili argumentis, ke la slovena popolo, kulturo, lingvo, tradicio, moralo kaj kredo estus detruitaj, se la partizanaj trupoj sub

absoluta komando kaj kontrolo de la komunista partio venkus, do ili batalas sian „sanktan” defendomiliton, por ke tio ne okazu. Ili ankaŭ argumentis, ke ili estis devigitaj alpreni fusilojn, eĉ tiujn de la okupatoro, ĉar provokitaj de la partizana teroro kaj tiu de VOS, per kiu estis krude likviditaj pli ol 1000 slovenoj, pliparte katolikaj sacerdotoj, katolike orientitaj instruistoj, urb- kaj vilaĝestroj kaj renomaj personoj de la publika kaj kultura vivo, antaŭ ol estis pafite el la fusiloj de la hejmdifenda milico.

Ĉu iliaj vortoj estis veraj? Ĉu ili vere batalis „por la fido, gepatroj, hejmo”, kiel ili propagandkantis? Ili deklaris sin „kristanoj”, sed ili kredis, ke la iro de la aferoj troviĝas en iliaj manoj kaj ne en la manoj de Dio. Ili argumentis, ke sen ilia fusilalprenado la partizan-komunista teroro ne ĉesos kaj teroragoj kaj likvidadoj daŭros plu; fakte pro ilia batalo nur dum certa tempo kaj en certaj regionoj la dorsatenkoj ĉesis, sed fine de la milito la tuta lando falis en manojn de komunistoj kaj ilia tuta militistaro estis pliparte mortigita kaj parte ĝi devis fuĝi de la komunista revenĝo transoceanen. Spite al tio la slovena popolo ne pereis, ne perdis sian kulturon, tradicion, lingvon kaj kredon. Ĝi perdis multe da sia moralo – sed pri sia moralo respondecas ĉiu por si mem. Verdire ankaŭ por sia kulturo, tradicio, lingvo kaj fido respondecas ĉiu por si mem. La kvazaŭ fidodefenda tendaro malutilis al la fido multe pli ol la intelekto kaj mondpercepte primitiva kaj perfortema ateismo de komunistoj. Ili funkciis kiel armitaj eŝalonoj de Romo kaj aliancoj de du ĝisfunde krimaj, al popolo, kulturo, tradicio, lingvo kaj fido malamikaj reĝimoj de la itala kaj hungara faŝismo kaj de la germana nacionalsocialismo. Spite al tio, ke ili dum la tuta periodo de ilia kontraŭpartizana militado estis laŭte kaj serioze admonitaj kaj ilia fina perea sorto estis klare antaŭdirita – ne de la komunista propagando, ekzemple de radio en Moskvo, sed de radio en Londono, per kiu parolis la reprezentantoj de la ekzilita jugoslavia reĝa registaro, inter kiuj troviĝis eĉ du altrangaj katolikaj sacerdotoj (d-ro Aloizo Kuhar kaj d-ro Izidoro Cankar), ili proklamis tiujn klarvidajn personojn perfiduloj kaj kontinuus per siaj fiaĝoj ĝis la militofino. Dum multaj iamaj partizanoj kaj komunistoj poste bedaŭris la krimagojn de sia tendaro kaj revenis al la religio de siaj gepatroj, la rom-katolika, kelkaj el ili eĉ vere konvertiĝis kaj fariĝis niaj gefratoj en Kristo kaj tiel liberigitaj de sia kulpo kaj de siaj pekoj – ĉe la katolik-militisma tendaro tia evoluo ne estas observita. Ili restis, kio ili ĉiam estis: antisemitoj, rasistoj, per usona demokratia lako superlakitaj klerikal-faŝistoj.

Resume: la sugesto de Aloizo, ke la nove instalitaj katolikaj sacerdotoj en Slovenio ne havu minuskompleksojn pro la agoj de ilia eklezio dum la milito, povas esti tradukita en pli klaran lingvon de kristana esprimklareco: Vi ne bezonas havi malbonan konsciencon pro la dumilita konduto de via eklezio, vi devas pro nenio penti kaj peti ĉe Dio pardonon, vi estas en Liaj okuloj bonaj kaj justaj homoj, eĉ se vi ne konvertiĝis kaj ne naskiĝis denove! Aloizo povus eĉ aldoni: Vi ne bezonas havi komplekson, eĉ se la slovena kontraŭkomunista milico en Triesto en la jaro 1944 arestis mian verkistan kolegon kaj kandidaton por literatura nobelpremio Borison Pahor kaj elmanigis lin al la germana sekretepolico Gestapo, ke li estis prenita en la plej terurajn naziajn koncentrejojn kiel Dachau kaj nur per miraklo restis viva, kvankam li neniun homon denunciis aŭ eĉ mortigis, nur ĉar li estis simpatianto de la slovena Liberiga fronto, per kiu komunistoj blufis pluralecan karakteron de sia partizana ribelo.

Ĉi tie mi devas rememori la polemikon de diversaj aŭtoroj kontraŭ la slovena ŝtatestro d-ro Danilo Türk, kiu reagis al la parolado de la papa nuncio en Slovenio, kiu dum la memorarango honore al mortigitaj slovenaj kontraŭkomunistaj legianoj diris, ke tiu krimo venis el la spirito de la sendia komunisma ideologio. La prezidento diris, ke tio estas vero, sed ne la tuta vero. Bone, unue ankaŭ mi devas kritiki la prezidenton. Ne decas, ke la suvereno de la ŝtato polemikas kontraŭ la diplomatoj de fremdaj landoj. Plej bone estus lasi la eldiritan opinion de la nuncio nekomentita. Se nepre, tio estas la afero de la ĉefministro aŭ la ministro pri eksterlandaj aferoj. Due: ne sufiĉas diri, ke ies starpunkto estas vero, sed ne la tuta vero; se tiel, oni devas klare kaj konkrete diri, kio mankas, por ke la vero estu kompleta. Aludi, sed ne vere diri, tio en la alta politika konduto ne estas konvena maniero kaj stilo.

Kaj kion diri pri la polemiko, kiu en unu el lastaj numeroj de *Družina* okupis pli da loko ol la religia enhavo de la tiu katolika semajngazeto? Ili polemikas maljuste kaj malracie, ĉar la prezidento en tiu ĉi punkto pravus. Estas vere, ke tiu kruela ago fare de gvidaj komunistoj, komence per Tito, estis unu el multaj venenaj fruktoj de la sendia ideologio de komunismo, kiajn oni povas observi en Sovetunio, Ĉinio, Albanio, Kampuĉeo, Nordkoreio kaj aliaj komunismaj ŝtatoj. Tion la prezidento agnoskis. Sed se tiu terura amaskrima ago havas en la komunisma ideologio sian spiritan kaj organizan patron, kie oni serĉu kaj trovi ĝian patrinon? – La „patrinon” oni ne devas longe serĉi; la ideologio kaj ĝia institucia portanto nomas kaj prezentas sin mem sub tia nomo: la rom-katolika eklezio – *Mater et Magistra* (patrino kaj instruistino). En la Biblio la vera Eklezio, fondita de Kristo kaj ĝis nia tempo gvidata de li, estas prezentita kiel la „fianĉino” (Apo 19,7) kaj kiel la „korpo de Kristo” (1 Kor 12,27), sed neniam kiel „la patrino”! En la Biblio eĉ la biologia patrino de Jesuo, Maria, ne estas prezentita la patrino de kristanoj. En la Biblio tio estas la nova Jerusalemo, kiu venos desupre (Gal 4,26). Tiu falsa „patrino” same, en la biblia senco eĉ pli, kulpas pro la okazinta krimigo fare de la komunistoj ol la „patro”, do la komunisma ideologio kaj ĝia portanto KPS mem. Kiamaniere kaj pro kio? Unue, ĉar ĝi dum jarcentoj instruis falsifitan evangelion kaj kaŝis kaj ŝlosis, certatempe eĉ per indeksa malpermeso (*Index librorum prohibitorum*) la aŭtentan vorton de Dio. El tio rezultis du falsaj religioj kaj sekve ankaŭ (mal)moralaj orientiĝoj. La unua orientiĝgrupo estas tiu, kiu anstataŭ al Jesuo kaj tra li kaj tiel en lia spirito, racio kaj amo al aliaj homoj kaj al si mem, estis fidelaj al tiu falsa „patrino”, kio dumhistorie manifestiĝis en preteco uzi mensogon, intrigon, perforton kaj murdadon por ŝajna „defendo de la kredo”, kiu fakte ĉiam estis nur defendo de falseklezia institucio kaj de ĝiaj generaloj (tiu ĉi militista titolo fakte svarmas ĉe katolikeklezia klerikaro!). La dua grupo samtiel naskiĝis el la utero de la romkatolika eklezio, eĉ se en formo kaj karaktero de ribelulo kontraŭ ĝi. Sufiĉe konate estas, ke la ribelulo alprenas multajn karakterajn trajtojn de la mastro, kontraŭ kiu li ribelas. Multfoje la ribelulo eĉ superas ĝuste la kruelajn trajtojn de sia mastro. Jozefo Stalin estis bona ekzemplo de tio, ja en tiu ĉi senco la eklezio de Romo kaj tiu de Konstantinoplo ne diferencas esence. Tiel ankaŭ la intercivitana milito en centra parto de Slovenio (1942-1945) estis fakte la afero inter du fratoj, naskiĝintaj kaj mense kaj morale formitaj de la sama „patrino”, la eklezio de Romo, eĉ se alpreninte du kontraŭajn poziciojn: unu de la falsa kaj pereiga fidelo, la dua de la sama falsa kaj pereiga ribelo. Kaj aldone la romkatolika eklezio kunkulpas la tragedion de 12.000 kruele turmentitaj kaj mortigitaj slovenoj post la militofino, ĉar ĝi spirite, intelekto, (mal)morale kaj parte eĉ rekte organize asistis kaj stimulis la frenezan fiaventuron de la slovena kontraŭkomunisma ribelo su la mensoga kaj demagogia slogano de „defendo de la hejmo kaj kredo”.

Manko de kulposento estas forta baro atingi pardonon de siaj pekoj kaj per novnaskiĝo heredi la regnon de Dio. Kio do pri falsa kontinuo dekstra?

Al nove instalitaj junaj sacerdotoj en Slovenio estus pli bone konsili malfermi la vorton de Dio, la Biblion, kaj en ĝi kontroli la pravecon de la teologistude akirita religio, kiu pro siaj falsifaĵoj daŭre aliancas kun mensogo, intrigo kaj perforto!